


*Koraje salutojn por ĉiuj*



JARO 6-JULIO-1994- N0 12

ASTURIO


## ENHAVO

Nia urbo.....	2
La Laponoj.....	3
Aŝguro.....	4
Taglibro de la hazardo	5
La Rozo kaj....	6
Pri la antikvaj asturoj	7
Ekvacio por la sukceso	8
Mozaiko.....	9
Kiko la koko.....	10
Kvin katoj k. unu raketo	12
Simpla rakonto (vera)....	14
Amuzaĵoj.....	15
Astura kanto.....	16



**REVUO DE LA AVILESA E-GRUPO**





Municipa ceramika lernejo

## NIA URBO

### Metio

De longtempe, Avilés estis laborcentro de metiistoj el tre diversaj specialecoj. La nomoj de iuj ĝiaj stratoj ankoraŭ rememorigas ĝian dediĉon estintece, tiel, "La Ferrería" (La Forĝistejo).

Ŝipmetiistoj, ŝnuristoj kaj maŝinistoj daŭre lasis paŝon al novaj teknologioj kaj materialoj.

Antaŭ nelonge ankoraŭ laboris "madreñeros" (lignoŝuistoj). -La "madreña" estas la tipa astura ŝuo farita ligne, - kaj unu kaldronisto el bronzo.

La regionaj kostumoj, kiujn konfekcias en la vilaĝo iuj metiistinoj, estas tre sollicitaj.

Sed, sendube estas la ceramiko la plej interesa metio de la zono. La nukleo terpotista kaj tegolista de Miranda, jam citita per Jovellanos en siaj kronikoj, estis rekuperitaj post longaj jaroj de forgeso kaj malzorgo. Nuntempe oni faras denove nigran ceramikon de Miranda simila al la plej konata de "Llamas de Mouro" kaj "Faro". En ties paroĥo funkcias Ceramika-Lernejo.

Plie mem en la centro de Avilés oni kreis la urban Ceramiko - Muzeo-Lernejon, kiu laŭ tiu de Miranda zorgas pri la konservado de la tradiciaj formoj kaj disvastigas ĝiajn instruadojn al aliaj aktualaj teknikoj.

La Redakcio.

Estraro de Antaŭen

\*\*\*\*\*

Prezidanto: Nicolás Muñiz

Sekretariino: Ma. José Faedo

Kasisto: Celestino Fernández

Bibliotekistino:

Ma. Luisa Menéndez

Desegnisto: Cisimo Rabanedo

Gekomitatanoj:

Olga Peña

David Menéndez

Eva González

\*\*\*

Nia adreso:

Casa Municipal de Cultura

33400 AVILES (Asturias)-

España

Subvenioita per la Registraro de  
Avilesa Municipo.

Depósito legal n-ro. Aa. -1.938 (9)





## La Laponoj

“En praaj tempoj Jubmel, la reĝo de ĉies dioj, kreis du fratojn. Ili vivis kune ĝis la vintro. Estis terura vintro; la vento siblis sen interrompo kaj la neĝo estis tiel alta ke la du homoj riskis resti sepultitaj. Tiam, unu el la du fratoj, plena de teruro, fuĝis malproksimen, ĝis ke li trovis rifuĝejon en profunda kaverno, li enfermiĝis tien kaj li ne eliris ĝis la printempo. La alia, tamen, decidis rezisti la malmildon de la klimato kaj li daŭrigis sian vivon subĉiele, luktante kontraŭ la neĝ-ventego. Kaj li postvivis.

De tiu ĉi venkulo devenas la laponoj; ni, kiuj estis elektintaj por vivi unu el la du regionoj pli malvarmaj el la Tero. De la alia frato, kiu ne sciis rezisti la malvarmon, devenas ĉiuj aliaj homoj, kiuj vivas je la suda parto de niaj regionoj”

Celestino



## AŬGURO



Ne petu al mi amoron, amatino mia  
ĉar, ni ne havas tempon por la amo  
vestu vin rapide; mi aŭdas paŝojn

Ankoraŭ ni havas iom da tempo  
por vidi la lastan stelon  
trairante efemera la ĉielon

Forlasu vian molan kaj sekuran liton  
akompanu min dum la finaj horoj,  
ni elĉerpu la nokton ĉe la fenestro.

Certe, la vetero estas malvarma,  
sed la milita boto,  
kiu jam alproksimiĝas, aŭskultu ĝin  
semos glacian neĝon en via ventro.

Ne petu al mi amoron, amatino mia  
vistu vin tre rapide kaj avertu,  
kiel la homo gvatas ree la homon  
kaj, kiel disfalas la Firmamenton.

Damego.





## TAGLIBRO DE LA HAZARDO

Oferdono

Mi volus ke mia plumo glitante hodiaŭ tra la paperfolietoj lasu mirhon de floroj, kiel silkan karesojn, kiuj parfumis per iluzio la spiriton por ilin oferdoni kvazaŭ dolĉan tapison, kien meti niajn plandojn lasante spuron de harmonio reĝinojn de l' beleco kaj amo.

Tremus en la etoso senfoliigo de lilioj en fragila paliumo, kiu protektus la superegan procesion kaj pie kovrus per aromoj la mildan delikatecon de iliaj floraj ĉarmoj.

La spirito revas en la dolĉeco de l' horo, rimante triumfan psalmon en sanktega sendo de la beleco kaj ĵetante el ahimezoj de l' iluzio la amforon de la poezio plenplenan pro fluo de gloro, kiu perligas sur la ora altaro de l' amo.

Mi pie klinas la frunton antaŭ tiu horo de virgulinoj, sklavo de l' beleco kaj de l' amo, kaj kiam mi pasu tuŝetante iliajn blankajn vestojn, kiel kolumbajn flugilojn mi detruas en pluvon de petaloj la floron de mia admirado.

Verkis: Luis Menéndez "Lumen"

Tradukis: Ma. Luisa Menéndez





## PRI LA ANTIKVAJ ASTUROJ

Ĉiuj montanoj estas sobraj, ili trinkas akvon, dormas sur tero kaj lasas siajn harojn longajn kaj disflugantajn laŭ la kutimo de la virinoj, kvankam, kiam ili luktas ili ĉirkaŭligas la fronton per strio. Ili plej ofte manĝas viandon de kapro kaj oferas al Ares unu el ĉi tiuj bestoj, kaptitojn kaj ĉevalojn: ili faras hekatombojn de ĉiu speco je la greka stilo, laŭ Pindaro rakontas: ĉion ili po cent' oferas.

Ili efektivas konkuradojn de tipo gimnastika, milita kaj de ĉevalkuradoj, kun luktoj kaj de gveriloj kaj de formacio per manipuloj. La montanoj nutras sin per glanoj du partojn de la jaro, lasinte ilin seki kaj pistante ilin; poste ili muelas ilin kaj faras panon el ili por ĝin konservi longatempe, ili ankaŭ trinkas bieron. La vinon, tamen, estas malabunda kaj, kiam ili ĝin atingas, ili tuj ĝin konsumas en festoj kun siaj familioj. Anstataŭ oleon ili uzas buteron. Ili manĝas sur apogiloj konstruitaj ĉirkaŭ la muroj kaj rezervante lokojn laŭe de la honoreco kaj socia pozicio. La manĝaĵon oni servas laŭcirkle kaj dum ili trinkas ili dancas laŭ la sono de la fluto kaj trumpeto ronde kaj ankaŭ saltante kaj kaŭre. En Bastetanja, virinoj dancas mikse kun la viroj ligataj permane.

Ili ĉiuj vestas daŭre nigre en tunikoj en kiuj ili ankaŭ kuŝas sur pajloloj. Ili uzas lignoglasojn kiel la keloj.

La virinoj uzas subjupon kaj vestaĵojn broditajn kun floroj. Anstataŭ moneron, tiuj kiuj loĝas en la plej kaŝataj anguloj uzas la intersanĝon de komercaĵoj aŭ donas tranĉitajn argentolamenojn. Ili ĵetas la kondamnitojn je morto preter krutejoj kaj la parensmortigintoj ili ŝtonumas ekster la limoj aŭ urboj.

Ili edziĝas kiel la grekoj. La malsanulojn, kvazaŭ egiptanoj antikve, ili metas sur la vojojn por ke tiuj demandu konsilon pri sia malsano al tiuj kiuj ĝin jam expertis.

Ili uzis ledosipojn ĝis la epoko de Bruto pro la pluvoj kaj koto kaj eĉ ankoraŭ estas maloftaj tiuj faritaj kun nura arbotrunko.

Iliaj salŝtonoj estas ruĝetaj, kvankam pistite blankiĝas.

Tia estis la vivado de la montanoj, kiel mi diris; mi signifas tiujn kiuj estas situataj norde en Iberio, galajkoj, asturoj kaj kantabroj ĝis la eŭskoj kaj la Pirineo, ĉar estas simila la vivmaniero de ili ĉiuj.

De Strabono, greka historiisto (75jaro a.K. - 20 jaro p. K)

Esperantigis Cezaro Garcia





## LA ROZO KAJ LA MALLIBERULO

La viro promenadis el unu al la alia parto en la eta korto de la malliberejo. Li estis izola, oni ne permesis la kunestadon de aliaj malliberuloj, ĉar li estis fuĝinto.

Dum la promenado siaj okuloj rigardis fikse belan Rozon kiu, meze de apuda ĝardeneto levis ĝian grandaniman belecon al la ĉielo, havante la radikojn teren, proksime al la trotuaro kien refoje la viro trairis.

Neniam, dum sia vivo, li vidis tiel belan Rozon; interna forto, nekomprenbla, impulsis lin alproprigi ĝin, meti ĝin kontraŭ sia brusto, spiri ĝian parfumon, tiel kiel enamorigita, kiu avidas havi sian paron kune kun li.

Li pensis ke sia deziro povus esti reala. La malfacileco estis granda, sed ne tiel grava kiel la pasinta fuĝo el la malliberejo, kaj li planis la okazon.

La gardistoj, situataj sur la anguloj de la korto nepre vidis ĉiujn liajn movojn se li kuraĝus preni la Rozon, kaj li estus bruiata bastonita kiel jam li konis eksperience okaze alvoki laŭvoce kamaradon loĝantan en karcerproksime al la sia. Li restis longantempe senforta, sur la grundo en miksaĵo kun la propraj urino kaj sango antaŭ reveni al la realo.

Li persone spertis jam dum sia vivo la timon, ankaŭ la maniero superregi ĝin. La Rozo estis tie al la trazo el sia mano. Preni ĝin, trafi ĝin estis kiel totala defio, kiel la rivalo de la fuĝo.

Sed kapti ĝin estis, egale, por li, obteni venkon sur li mem. Ĝi estis intima maniero afirmi sia volo esti libera. Tio estas malfacila kompreneble por tiuj kiuj ne vivis la saman situacion, oni ne povas koni la forton, ĝis la frenezo kiun cerbumas la viro kiam li estas kiel entombigita viva.

Li sciis ke se li povus spiri la aromon de tiu floro, havi ĝin apud siaj lipoj, sur sia brusto, li sentus sin kuragiĝi por renovigi sian vivon, por esperi ĝui ĝin denove, eble antaŭ ol li pensis.

Komprenoble, foje la korporeco alproprigis al li kaj konsilis al li forlasi la ĉelon. Sed iun fatalan montrigis en lia konscienco viviginta lin plenumi lian projekton, lian deziron.

Jam venkitaj la dudoj li posedis la Rozon. Dum kelkaj promenadoj li profitis la favoran okazon. Li sciis ke tuta la rutinavigleco iu ajn malzorgigas. La samaj movoj, la samaj horoj de promenado, ĉiam egale, tago post tago; foje la gardistoj eĉ ne rigardas.

Li decidigis. Estis sufiĉe doni unu solan paŝon kaj preni la deziritan floron. Do tiel li faris sen senti preskaŭ doloron kiam la dornoj de la Rozo penetris tra la ĥauto en la mano; li forprenis unu tra la alia kiam li revenis en ĉelon.

Poste li decidis tion, kion fari por daŭrigi la konservadon de la Rozo.

En la propra ĉelo nur estis sako kun ion da pajlo kiu servis de pajlomatraco por pasi la nokto, ĉar dormi estis dificila afero en tiamaĵ cirkunstancoj kaj kelkaj noktoj totale neeble fermi la okulojn.

Bone, "en tio loco kien la mizero havas ĝian sidon", ene tia malliberejo, malbenita floro de la reakcia socio, la viro sukcesis kapti la Rozon.


Dum la mallongaj momentoj kiu li povis uzi la kuleron, du foje tage, li profitis la okazon por fari vertikalan fendon en la antaŭa parto de la sidloko de la necesejo. Tiel li evitis ke la Rozo estus malkaŝita.

Tien restis la Rozo, dum kelkaj tagoj li spiris ĝian parfumon. kiun lante vaporigis...

Kiam kvardek jaroj poste la viro kaj ĉiuj kiuj estis dum kelkaj jaroj en la malliberejoj rememoras la Rozon de V. Espin Tamarit sentas la esperon ke iun tagon grandega bukado de Rozoj montros al la homaro la padon de la libereco.

Esperantigis N. Muñiz el la verko "La Fuga de Ocaña" (Yañez kaj Aliaj)





## EKVACIO POR LA SUKCESO

Sendube, Alberto Einstein estis unu el la plej grandaj homoj el la homaro. Naskiĝita en Germanio, origine Juda, kaj naciĝita Nordamerikano, li elstaris pro sia inteligenteco, pacismo kaj ega boneco. Li ne nur estas la aŭtoro de la "Teorio de la Relativeco", sed oni povas ankaŭ konsideri lin kiel la patro de la moderna Fiziko.

Foje, maloportuna junulo demandis al li kio estis, laŭ li, la sekreto de la sukceso. Li estis certa ke la scioplana malkovrado de tiom da sekretoj de la Naturo povis kondensi la respondon en ekvacio.

Einstein, komprenante la urĝecon por fini kun la impertinenta demandanto, sen diskute, skribis tiun-ĉi ekvacion sur papiereto:

$$S = L + B + S$$

-Tre bone! -la maloportuna junulo ekkriis- kaj kion signifas tiu-ĉi ekvacio?

-Tre simpla- Einstein klarigis. -S estas la sukceso; L, la laboro; B, la bonsanco.

-Kaj la lasta S?

-La lasta S estas la silento

Maria José Alvarez Faedo



# MOZAIKO

## Nekrologo

Antaŭ kelkaj monatoj forpasis en Gijón nia bona amiko kaj kunlaboranto, sinjoro Sacramento Collado Cruz. Ĉiuj membroj de la avilesa esperanta-grupo ANTAŬEN funebras pro tiu dolora perdo. Ripozu pace!

Por la familio, ni sendas nian plej grandan kondolencon.-

La Prezidanto de ANTAŬEN kune kun aliaj membroj, de la sama grupo, partoprenos en la 53 a. Hispana Kongreso de Esperanto, okazonta ĉijare en la bela urbo Malago. Ĉiuj deziras al la estraro la plej bonan sukceson.

\*\*\*\*\*

En la pasinta monato junio, Niko k. Maria Luisa vojaĝis ĝis Magdeburgo por pasigi iujn tagojn, kiel gastoj de inteligentaj kaj laboremaj letergeamikoj, Edith k. Horst. Ili kunvenis kun la grupo de la germana urbo parolante inter ĉiuj pri la disvolvado de la Esperanto-movado.

\*\*\*\*\*

## Korespondi deziras:

Kalju Junts.- Lääne Maakond.-Ridala S j K. Parila  
E.E. 3181- Estonio


Kun geesperantistoj el diversaj landoj pri ĉiuj temoj. Kolektas bildkartojn kaj monerojn.

Ivan Petrov.-bul Mogilev 35 - ap. 10  
5.300 Gabrovo. Bulgario

Kun geesperantistoj de la t. m., precipe pri temoj de komerco, turismo kaj industrio.







## Niaj Geamikoj:



# KIKO LA KOKO

Kiko estis bela besta specimeno. Ĝi posedis arogantan kapon ornamitan per ruĝa impona karna kresto, ruĝajn karunklojn kaj fortan bekon. Ĝiaj buntaj kaj brilaj plumoj, ankoraŭ plibeligis ricevinte la sunajn radiojn. La fortaj manoj enhavantajn longan akutan ergoton, lasas profundajn videblajn spurojn post ĝia pasado.

Kiko kunvivis en korto kun aliaj samspecanoj: du kokoj kaj dekduo da kokinoj, kiujn ĝi, fanfara, despoto kaj tirano, kiel la plej multo el la fortuloj, submetas ĉiumomente al ĝia volo.

La kokinoj estas ĝia absoluta posedaĵo, neniu el la du maskloj povas ilin tuŝi, eĉ nek alproksimiĝi ĉar, male, ili ricevos fortajn bekofrapojn. Pruvo el tio estas la vundospuroj, kaj manko de plumoj, kiujn ambaŭ montras en diversaj lokoj el ĝiaj korpoj. Nek la kokinoj liberigās de la kolero de Kiko. Ĉiuj ili timas ĝin.

Venis tago kiam la mastro de tiu farmeto acetas paron de gepavoj, ankoraŭ tre junaj kaj metas ilin en la komuna korto. Baldaŭ Kiko sciigas la fresalvenintojn, kiu estas tie la estro, uzante identajn metodojn, kiel tiujn uzitajn por ĝiaj samspecanoj, kiuj tiel bona rezulto donis al ĝi.

La tempo lante pasas. Nenian novaĵon menciindan okazas dum du longaj monatoj, krom tio ke la du gepavoj kreskas kaj fortiĝas, Tamen, pri tio Kiko ne konscias, ĝi ankoraŭ estras.

Iun tagon, post atako de Kiko, la pavo furioziĝas kaj decidas ne plu toleri la superpotencon, arogantecon kaj koleron de Kiko kaj kontraŭatakas. Ekestas baldaŭ inter ambaŭ korbirdoj sangema batalo, ĝis kiam finfine la pavo kurigas Kiko-n ĝis angulo de la korto, al kiu alkuras la furioza pavo, deziranta fini la komencitan taskon. Kiko, kvazaŭ frenezulo, preskaŭ blinda, nur deziras kuri, fuĝi, sed ĉie ĝi troviĝas iun malamikon, deziranta venĝi pasintajn agredojn.



La konfuzo en la korto fariĝas ĥaosa, kaj la blekado atingas laŭtajn nivelojn.

Aŭdinte la blekadon, la mastro eniras en la korton kaj tuje konscias pri la tie okazinta. Sur la grundo kuŝas Kiko senpluma, abunde sanganta, duonmorta, Kelkaj plumoj ankoraŭ flugas en tiu cirkonstanca batalekampo.

La mastro reagis prenante la malvenkinton kaj finas la taskon komencitan de la malamikoj de Kiko. En tiu tago, en tiu momento, finis por Kiko ĉiujn ĝojojn kaj malĝojojn. Tiu orgojla estaĵo sin kredanta la umbiliko de l' mondo, tiu orgojla estaĵo, kiu longe superregis en malgrandeta regno, ne plu povos altrudi sian volon, siajn dezirojn, al siaj malamikoj, ĉar, finfine ili venkis ĝin.

La aroganteco de Kiko, ĝia malbona uzado de forto, okazigis ĝian malfelicon kaj senpripensan kaj subitan morton. En tiu tago, ĝi lasis esti bela kaj fiera besto, por transformiĝi en bongusta kaj abunda manĝaĵo por la mastro kaj lia familio.

Tiajn konduktojn, kiel la altrudita de Kiko, adoptas ĉiutage centoj, miloj el niaj samtempuloj, kiuj per mono, forto, povo, submetas al iliaj kapricoj aŭ tiraneco al miloj, milionoj da homoj dum tempo. Laŭlonge de la homa historio estas sennombraj atestoj pri tio.

Kaj jen demando: Ĉu indas esti tiel aroganta, tirano kruela, despoto, egoisto kun la aliuloj, kiam la vivo sur la tera surfaco estas tiel efemera? Kiu semas venton rikoltos fulmotondron. Kelkfoje, tiuj "elstaruloj" ricevas parto el la puno, kiu ili trudis al iliaj subuloj aŭ ceteraj homoj, kiel okazis al Kiko kaj tiam, ili estas pli malkuraĝaj ol la plej malfortulo al kiu ili centoble punis aŭ humiligis.

Ĉu ne estus pli bone semi amon, felicon, karitaton, kio, samtempe, rezultas pli fruktodona kaj kontentiga por la semanto?

Ni devas serioze mediti pri la afero.

Gijón. Aprilo 1994a

IDOLO



# Kvin katoj kaj unu raketo

Plenlunis, kaj kvin katoj kunvenis sur tegmento. Fakte, la katoj multe ŝatas la plenlunon, ĉar ĝi sugestas al ili teleron da lakto.

—Sendube ĝi estas el lakto! —asertis unu el la miaŭuloj.

—Eble ĝi estas el neĝo —opiniis alia.

—Ĝi devas esti el lakto! —samtempe ekkriis la ceteraj.

Tiel naskiĝis la ideo. Se la luno konsistas el lakto, granda festeno atendas la katon, kiu havos la fortunon ĝin atingi.

—Ni konstruu raketon!

—Ĉu vi opinias, ke la katoj ne povas esti kosmonaŭtoj?

El malnova balailo kaj granda kermesa petardo, ili konstruis kosmoŝipon en nur malmultaj minutoj.

—Ek al la luno, felisoj! —kriis Gratulo, kiu estris la ekspedicion.

Gratulo ekbruligis la meĉon de la petardo, kaj la kvin katoj sentis la fortan skuon de la ekflugo.

—Jen ni flugas!

Vere, la improvizita kosmoveturilo leviĝis super la tegmenton.

Subite tondris eksplodo sub la kruroj de la katoj, kiuj falegis.

—Fajro! Mi brulegas! —kriis unu.

—Ni falis sur la sunon! —plendis alia.



Flamoj ĉirkaŭis la katojn, sed lavango da akvo mirakle savis ilin de forbrulo.

—Oho! Ni estas en la kuirejo de mia hejmo!  
—ekkriis Gratulo.


Tiel estis. La katoj falis tra la kamentubo ĝuste sur la fajrujon, kaj la mastrino de Gratulo savis ilin de la katastrofo per kruĉo da akvo.

—Nun, pafu vin for! —gruntis la virino, dum ŝi prenis la “kosmoveturilon” en siaj manoj, kaj per la balailo komencis bati la kosmonaŭtojn.

Tiel finiĝis la aventuro de la kvin katoj, kiuj ne plu emis vojaĝi al la luno.

El la libro "La ballena jugetona" de la eldonejo "Susaeta S.A."

**Trd. : Micjo Drako Bona**







## SIMPLA RAKONTO (Vera)

"Ili akordiĝas kiel hundo kaj kato". Jen la kutima esprimo por indiki malakordiĝon. Sed, sed... Klaúdo estas kamplaboristo. Li posedas senrasan hundinon Pikul', dikan ŝafhundinon, kiu lin akompanas dum la laboro. Tiun junian tagon, li rikoltis persikojn kaj kiel kutime Pikul' vagadis tra la grandaj fruktarbejoj. Rapide Pikul' revenis, tenante en sia faŭko katidon, tre junan katidoŝ, kies okuloj estis ankoraŭ fermitaj. La hundino delikate metis la besteton sur la grundon, kuŝiĝis apud ĝi kaj zorgè lekis sencese ĝis kompleta purigado de la felo. Certe tiun ideton iu forĵetis en akvon, koton? Neniu scias kio okazis. Vespere, kiam Klaúdo volis reveni hejmen perveturile, la hundino ĵaluze reprenis "sian filon". La infanoj ekkriis pro ĝojo je tiu alveno kaj nutris la katidon per lakto en suĉbotelo. Ĝia nomo? Divenu: D'Abboville! (ĉu vi memoras tiun kuraĝulon, kiu trairis Pacifikon per remilŝipo?), ĉar la kato multe piedsvingis, Dab (jen la mallongigo) bone fartas. De tiu tempo, Pikul' estas patrino. La du bestoj dormas kune, ne manĝas kune, ne pro disputoj, nur pro malsamaj gustoj.

Tute simpla afero, kiu povus instigi homojn al simila sinteno, ĉu ne?

Kunlaboris: Suzanne Authier (Francio)





# Amuĝoj

CISIMO



## PRAULO

En la lernejo la pastro klarigas la miraklon de la kreitaro de la viro.

Iu lernanto atente aŭdas, poste demandas.

-Sed instruisto, kial mia patro diras ke ni devenas el la simioj?

Kaj la instruisto respondas.

-Diru al via patro, ke la historio de via familio ne interesas al ni

## ALMOZETO

Almozulo haltas promenanton.

-Donu al mi ducentmil pesetojn por trinki unu kafejo.

-Sed vi estas frenezulo, tiom da mono por unu kafejo!

Ŝatus al mi vojaĝi ĝis Brazilo por trinki la kafon

## LA MONUJO

Nuda virino eniras kafejon, kaj petas al la vendisto glason da viskio.

La vendisto silente rigardas ŝin.

Ŝi kolere demandas lin.

-Ĉu vi neniam vidis nudan virinon, ĉar vi tiel gapas pro mi?

-Jes, mi multajn vidis. Sed jen al mi interesas de kie vi elprenos la monon.

## APETITO

-Kial vi petas almozon?

-Ĉar mi volas manĝi, sinjoro.

Kial, do vi ne laboras?

Ho, kiam mi laboras, mi sentas ankoraŭ pli grandan deziron manĝi

## PETAĴO

Mi petas humoraĵojn el diversaj landoj por publiki en ĉi-tiu revueto. (Mi antaŭdankas)

Sendu al:

CISIMO R. SIMON

c/ La Magdalena, 26-1-D

33400 AVILES Asturias-

España

## DU INSTRUISTOJ PAROLAS

-Mi havas lernanton, kiu ne komprenas la diferencon inter "mi" kaj "vi".

-Kara kolego, tio ne estas malfeliĉo, mi havas lernanton, kiu ne scias la diferencon inter "mia" kaj "via"



# SURVOJE AL LA BALO

(La romería de San Andrés)

Allegretto

GIRALDILLA

The musical score consists of six staves of music in G major (one sharp) and 2/4 time. The tempo is marked 'Allegretto'. The lyrics are written below the notes. Chord symbols (Mi, Si7, La) are placed above the notes. The lyrics are: 'Se vi, dum la Sank-tej fes-to, de-zi-ras ti-om dan-ci kun mi, — rie-pre al mi do-nu Ki-on mi de-man-das: Ki-son mal-gran-de-tan pli dol-ĉan ol tri. — Kaj ri-ce-vin-te la vi-an, mi ka-ru-li-no, do-nos al vi, — a-li-an Ki-se-ton mal-gran-dan mal-gran-dan a-li-an Ki-se-ton pli dol-ĉan ol mil. —'

## TEXTO ASTURIANO

Si "quiés" que baile contigo  
en la romería de San Andrés,  
has de dame, neña,  
lo que yo te pida:  
un besu pequeñu  
que valga por tres.

bis

Después que baile contigo,  
morena mía, yo te daré  
otru besu mío,  
pequeñu, pequeñu,  
otru besu mío  
que valga por diez.

bis

## ESPERANTA TEKSTO

Se vi, dum la Sanktejfestoj,  
deziras tiom danci kun mi,  
nepre al mi donu,  
kion mi demandas:  
kison malgrandetan  
pli dolĉan ol tri

bis

Kaj ricevinte la vian,  
mi karulino, donos al vi,  
alian kiseton  
malgrandan, malgrandan  
alian kiseton  
pli dolĉan ol mil.

bis